

Esperanto-Ferio-Semajno en FÜRIGEN
Claude Gacond, 416-a radioprelego, 1971.09.29 & 10.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la unua semajno de septembro okazis en FÜRIGEN, apud Luzern, la 13-a Eŭropa Ferio-Semajno en Svislando organizata de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj.

A.- Kiel deĵorantoj de la libro-servo de Kultura Centro Esperantista ni havis la okazon partopreni la du unuajn tagojn de tiu agrabla manifestacio.

Cl.- FÜRIGEN troviĝas sur rokaro borde de la Kvarkantona Lago, vidalvide de la monto Pilatus, kiu staras apud Luzern kaj anoncas la altajn suprojn alpajn.

A.- Por atingi la kongresejon, kiu estis vasta, iom malnovstila, sed tre komforta hotelo, ni devis uzi la servon de funikularo. Tiu veturilo krutege deklivis. Ĝi kondukis nin de la bordo de la lago ĝis mirinda belvidejo. El la terasoj kaj salonoj de la hotelo ni povis admiri vastegan panoramon kun lagoj, montoj kaj vilaĝoj. Tage kaj nokte tiu pejzaĝo altiris la rigardojn, ĉu per la ŝipoj, kiuj konkursis sur la lago, ĉu per la lumoj de la aŭtomobiloj, kiuj markis la ĉefvojojn.

Cl.- Partoprenante restadon, kiu estas gvidata de fervojistoj, oni havas la agrablan senton ĉeesti bone programitan manifestacion. La horaron oni senpene povas observi.

A.- En FÜRIGEN la programeroj trankvile kaj akurate plenumiĝis, kio estas neceso en ferio-semajno. Post la matenmanĝo formiĝis studrondoj, kaj la matenoj estis dediĉitaj al progresado en la lingvo-kono. Sekvis memserva manĝo bongusta. Kaj poste estis la tempo ekskursi. Ni revenis sufiĉe frue antaŭ la vespermanĝo, por povi ripozeti admirante la pejzaĝon. Kaj vespere okazis komunaj kunsidoj.

Cl.- Ni ĉeestis du ekskursojn. La unua kondukis nin per aŭtobuso al la vilaĝeto de Nikolao von Flue, la sola sanktulo de Svislando. La domoj, kie li naskiĝis, vivis kaj mortis, restis senŝanĝaj. Tio permesas imagi kiel vivis tiu riĉa kamparano de la dekkvina jarcento, kiu subite forlasis sian familion por mediti pri la vivo kaj okupiĝi pri la tiamaj interkantonaĵ kvereloj, kiuj minacis la ekzistadon mem de la Svisa Ligo.

A.- La dua ekskurso donis al ni la okazon fari agrablan ŝip-ekskurson sur la tiom ŝanĝanta Kvarkantona Lago. Neniam ni estas en la sama lago, ĉar ni ĉiam eniras novajn lagbrakojn. Kaj la montoj, la unuaj suproj de Alpoj, donas deziron ĉion viziti. Tion vidante, oni komprenas, kial la svisaj fervojistoj intencas aranĝi la venont-jarajn Ferio-Semajnojn en la sama loko. En unu semajno ne estas eble konatiĝi kun ĉiuj ekskurseblecoj de tiu turisme riĉega regiono.

Cl.- Nin tre interesis la matenaj kursoj. Ili pruvas, ke la fervojistoj ne nur estas migremuloj, sed ankaŭ studemuloj.

A.- Tiuj stud-horoj estis novaĵo, kiun iniciatis tiu dektria Eŭropa Ferio-Semajno. Kaj tutcerte tiu eksperimento respondis al profunda bezono flanke de la partoprenantoj. La tri kursoj estis bone vizitataj, kvankam ili ne estis devigaj.

Cl.- Emerita gimnazia instruisto, sinjoro Paul Bächli, gvidis elementan kurson, kiu grupigis la krokodilojn. Per kolektiva instruado li provis paroligi tiujn partoprenantojn, kiuj plej ofte estas edzoj aŭ edzinoj de esperantistoj. Estus bone, ke simila kurso por komencantoj ĉiam okazu en esperanto-manifestacioj, kie krokodiloj estas akceptataj.

A.- La granda plimulto de la partoprenantoj sufiĉe egale dividiĝis inter la du aliaj stud-rondoj. Komence de la mateno ili ĉiuj kune aŭskultis prelegon de sinjoro Fritz Liechti, la prezidanto de Esperanto-Societo Zürich.

Esperanto-Ferio-Semajno en Fürigen
Claude Gacond, 416-a radioprelego, 1971.09.29 & 10.02

Cl.- Tiuj prelegoj estis dediĉitaj al la parol-arto. Sinjoro Fritz Liechti ilin detalege pretigis, registrinte necesajn ekzemplojn.

A.- Post paŭzo la du grupoj dividiĝis. En la granda salono restis la mezuloj sub la gvidado de sinjoro Hans Hunkeler. Ili laŭtleĝis tekstojn el la romaneto *La Verda Koro* de Julio Baghy kaj ilia prononcado estis korektita. Ili ricevis gramatikajn kaj vortarajn informojn.

Cl.- La grupo de la plej lertaj esperantistoj ricevis diskuttemon. Diskuttrondetoj formiĝis kaj debatis pri tiu temo. Unu respondeculo devis noti la punktojn pritrakitajn, kaj poste, en la granda salono, devis resumi la diskutadon kaj konkludojn de sia diskuttrondeto.

A.- Ĉiuj aŭskultis kun intereso tiujn raportojn, la mezuloj, kiuj tiel estis informitaj pri la diskuttemoj de la lertuloj, kaj la lertuloj, kiuj tiel estis informitaj pri la konkludoj de la aliaj diskuttrondoj.

Cl.- Sinjoro Fritz Liechti, la kurs-estro, tre atentis, ke ĉiutage aliaj personoj raportu, tio por eviti, ke la plej babilemaj kursanoj ĉiam havu la parolon.

A.- La diskuttemoj dum la du unuaj tagoj estis : *Ĉu Eŭropa Federacio estas ebla ?* kaj *Kial esperanto malrapide progresas ?* En unu horo ne estis eble al tiuj diskuttrondetoj ĝisfunde pritrakti tiujn temojn. Cetere ne estis la celo de la kursgvidanto. Kion li celis, tio estis diskutigi la kursanojn, kaj li sukcesis. Poste lia celo estis raportigi delegitojn de la diskuttrondoj, kaj ankaŭ li sukcesis.

Cl.- Pro tio ni opinias tiun eksperimenton tute pozitiva, kaj ni multe kuraĝigas la svisajn fervojistojn reokazigi similajn kursojn en la venontaj Ferio-Semajnoj, kiujn ili organizos.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-